

Numero: 290.  
Julio: 2016.

24-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Kiu estas la estonta lingvo de la homaro

Antaŭ nelonge mi aŭdis, oni sufiĉas lerni nur unu fremdan lingvon kaj oni povas komprenigi sin ie ajn en la tuta mondo. Tiu lingvo estas la angla. Ĉie oni parolas kaj komprenas ĝin.

Ĉu vere ĉi tiu lingvo atingis tiom grandan karieron, ke ĝin oni komprenas en la tuta mondo? Ĉu en la estonto la homaro uzos nur la gepatran kaj la anglan lingvojn.

Laŭ mi ĝi estas belega sonĝo en la cerbo de la revemuloj.

Fakte ankaŭ ni geesperantistoj estas revemuloj. Ankaŭ ni deziras, ke nia belega kaj utila lingvo plenumu ĉi tiun rolon en la mondhistorio.

Mi estas konvinkiginta, ke nia deziro estas pli reala, ol la lingvo de la britoj.

Kial mi asertas ĉi tion? Certe vi estas scivolaj kaj vin interesas mia opinio.

Ĉiu devas scii, preskaŭ ĉiu mondlingvo fortiĝis pere de sango, subpremo. Miloj da homoj suferis de la koloniistoj, kiuj parolis ĉi tiujn mondlingvojn. La koloniistoj devigis ne nur sian lingvon, sed ankaŭ la kulturon, religion ktp. Ofte estis malpermesite uzi la lokajn lingvojn. De tago al tago velkis la nacioj, malnovaj tradicioj. El ili restas nur kelkaj turismaj atrakcioj, por ke la venintoj el la lando de la kolonigantoj.

Laŭ mi ankoraŭ longtempe homaro ne havos unuanime akceptitan pontolingvon. Lingvoj venos, lingvoj iras. Dume la homoj uzas diversajn lingvojn por komprenigi sin.

Do, en la mondo regas terura lingvoĥaoso. Ĝi kaŭzas multe da problemoj, la tradukado kaj la interpretado estas tre multekosta. Ĉi tiun monosumon ni povus oferi por aliaj, pri gravaj celoj.

Ni geesperantistoj ŝatus, se nia amata lingvo plenumus ĉi tiun rolon kaj la zamenhofa lingvo fariĝus la dua gepatra lingvo de la homaro.

Multaj jam entombigas Esperanton. Antaŭ nelonge viro demandis min: Ĉu ankoraŭ ĉi tiu lingvo ekzistas?

Jes, ni homoj droniĝas en la maro de la lingvoj. La lingvolernado forrabas de ni multe da tempo. Ni klopodas ellerni iun mondlingvon. Fine ni ĝojas, se en ĉi tiu lingvo ni povas balbuti kelke da vortoj.

La lingvolernado estas malfacila afero. Verdire oni diras, la lernado de iu lingvo ne bezonas specialan kapablon. Sufiĉas, se la lingvolernanto estas diligenta kaj persista.

Eble. Malgraŭ tio, se ni ne povas enproprigi la lernatan lingvon, tiam ĉio estas vana kaj ni nur luktas kontraŭ ne vidata monstro.

Kara Leganto, kiu lingvo fariĝu la dua gepatralingvo de la homaro?

-Redaktanto-

## Vojaĝo al Esperanto kongreso

La trajno kuregis inter montoj kaj tra floraj kampoj.

Estis somere. Ĉio estis varmega. La aero apenaŭ movis. La pasaĝeroj estis preskaŭ svenintaj pro la varmego.

Neniu parolis en la kupeo. La junulo mute rigardis la dormantan knabinon. Ŝi estis blonda kaj longharara. En la angulo de ŝia eta buŝo kaŝiĝis rideto.

-Ĉu ŝi sonĝas? Pri kio? - demandis la junulo. Kompreneble ĉi tion neniu aŭdis, ĉar li demandis tre mallaŭte.

Subite la kupeo malheliĝis. Longa tunelo sorĉis nokton por la pasaĝeroj. Nur malgranda lampo lumis pale.

Post kelkminuta veturo ili forlasis la tunelon. Suno denove brilis kaj en la malproksimo bluaj montoj vidiĝis.

-Kio okazis? - demandis mire la knabino. - Ĉu ni alvenis?

-Ankoraŭ ne - respondis la apuda virino. Eble ŝi estis la patrino de la ĉarma knabino, ĉar ili tre similis unu al la alia.

Neatendite falis surteren la mansaketo de la knabino. La junulo tuj klinis sin kaj li levis ĝin.

-Bonvolu - li diris - via mansaketo defalis.

-Ho, mi dankegas - pepetis la knabino. Ŝi denove deziris fermi la okulojn, se ŝia patrino dankeme turnis sin al la junulo.

-Kien vi vojaĝas, junsinjoro?

-Al urbo X.

-Ankaŭ ni - venis tuj la respondo. - Eble ankaŭ vi vojaĝas al Esperanto kongreso. Ĉu ne?

-De kie vi divenis? - demandis la junulo. - Jes mi vojaĝas al Esperanto kongreso.

La virino ekridetis kaj ŝi montris per sia fingro al lia insigno, kiu estis bone videbla sur la T-ĉemizo.

-Vi estas esperantisto - diris la virino. - Ĉu ne?

-Kiom interese, ni kune vojaĝas plurajn cent kilometrojn en sama kupeo kaj nur fine antaŭ la urbo X mi ekscias, ke mi kune vojaĝas kun du samideaninoj.

Ili baldaŭe alvenis. En la stacidomo kelkaj lokaj geesperantistoj atendis ilin.

Li jam ne estis sola. Li elvagniĝis, kiel geamikoj kun la ĉarma knabino kaj ŝia patrino.

Ilin atendis la kongresurbo kun multaj travivaĵoj.

-Ŝaŝa.



# POEZIO

Kiu legas nun poemojn? Se surstrate vi demandus la homojn, mi estas konvinkiĝanta, ke el dek nur unu aŭ du opinius, legi poemojn estas grandioza afero kaj ili ĉiufoje legas ĝin.

Verdire ankaŭ la legado ne estas moda. De jaro al jaro malpli da homoj, precipe gejunuloj malfermas poemlibrojn.

Ĉu ĉi tio estas natura afero? Ĉu ĝin alportis al ni la moderna vivoformo?

Oni ŝaltas komputilon aŭ spektas televidilon kaj per ili kolektas sciojn, informojn pri la mondo. Sed ĝi estas supraĵa sciokolekto. Ni homoj scios preskaŭ nenion pri la mondo, se ni ne legas poemojn.

Esperable en Esperantujo la statistiko estas pli bona. Ni geesperantistoj eble ankoraŭ pli ofte foliumas belegajn kaj valorajn librojn, gazetojn kaj revuojn plenaj de poemoj kaj versoj.



## Clelia Conterno

Vi faris  
el doloro ĝojon  
el la plor' rideton  
el ofer' donacon  
el la viv' altaron  
kaj florojn el la dornoj  
kaj lumon el obskuro  
kaj fajron el la frosto,  
vi  
revo de ĉiu sopiro  
brilo de ĉiu aŭroro  
flamo de ĉiu fajrero,  
vi, Atendito.



## Klara Ilutoviĉ

Vi kreis ĝojon el doloro,  
kuraĝan vorton el hezito,  
Rideton el ĉagren' kaj ploro,  
vi, atendito.

El dorno vi estigis floron,  
vi skulptis ondon el granito,  
vi naskis el ofero gloron,  
vi, atendito.

Vi estas rev' de ĉiu koro,  
flam' de l' naturo kaj spirito,  
en ĉiu brilas vi aŭroro,  
vi, atendito.



## Mikaelo Ternavski

### „mi pleje timas...”

mi pleje timas  
ke vi alvenos, sed jam tardos  
ne havos pomojn mia pomarbo  
kaj mi nenion povos  
al vi proponi  
mi pleje timas  
ke vi alvenos sed jam tardos  
rivero glaciigis kaj mi ne povos  
veturigi vin en mia boato  
kvankam la boaton mi ankoraŭ havos  
mi pleje timas  
ke vi alvenos sed jam tardos  
... mi estas sola ... en mia boato  
plena de aromaj pomoj



# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
XXV-a

„Nun kion fari?” – haltis subite Johano. – Ĉu reiri al Izabela aŭ helpi Elinjon, kiu estis en granda danĝero trans la vitromuro.

Li sentis teruran doloron en siaj piedoj.

Dume la onklino senĉese kriadis.

–Ne lasu min sola! Revenu!

Fine li elbuŝigis.

–Kara onklino, baldaŭe mi helpos. Ne timu, mi ne forlasos vin.

Lia voĉo sonis tre necerte kaj malforte. Li ne sciis, ĉu la onklino aŭdintus ĝin.

Johano plu serĉis la trairejon sur la vitromuro. Tio estis vana laboro. Nenie estis eĉ malgranda pordeto, kie li povus trairi.



Ekscitite li kuradis tien kaj reen. Elinjo panike mansignadis al li. De tempo al tempo ŝia voĉo fariĝis pli mallauta.

Li haltis kaj disetendis siajn brakojn per ili signante, li povas fari nenion. Li ne povas trairi la vitromuron. La junulino ekteriĝis. Johano bone vidis ŝian malgajan vizaĝon. De sur ĝi radiis la timego.

Li ĵetis rigardon al la onklino Izabela, kiu senĉese kriadis. Vere pro io li ne aŭdis ŝian voĉon.

Johano muelis sin inter du virinoj. Tio estis la plej timiga, ke li povis helpi al neniu.

Se almenaŭ li povus faligi ĉi tiun damnitan vitromuron, eble tiam li trankviliĝus.

Li sidiĝaĉis sur la teron kaj li metis sian kapon en la manplato. Lia tuta korpo tremis. Ĉio estas perdita. Li sentis tie rezignante. Eble alvenis la fino. El ĉi tiu kaptitoli ne povos liberiĝi.

Trans la vitromuro Elinjo ploregis atendente esperon de Johano, sed li ne povis helpi. La vitromuro baris la vojon antaŭ li.

Li devus reiri al la onklino Izabela. Kiam li denove rigardis al ŝi, Johano ne vidis la oldulinon. Kie ŝi estas? Kio okazis al ŝi?

Ankaŭ Johano surprizis, ke lin ne interesas la malapero de la onklino. Lin ege ĉagrenis la sufero de Elinjo kaj li ne povas helpi al ŝi.

Tiam okazis neatendita evento trans la vitromuro. Unue la junulino fariĝis flava kaj li komencis brili, kiel mistera lumo.

La tuta fenomeno daŭris proksimume du aŭ tri minutojn. Post la stranga afero, kiam la blindiga, flava estingiĝis anstataŭ Elinjo li vidis nur suprenleviĝantan vaporon, kiu malaperis post kelkaj sekundoj.

–Elinjo, kie vi estas? – li kriegis nerveze kaj li denove komencis serĉi la trairejon.



Furioze li ekbatis la vitromuron. Vitro laŭtega tintante rompiĝis. Fine ĝi malaperis, kvazaŭ neniam ĝi estintus tie.

Nova miraklo, kio frakasis Johanon. Malgraŭ tio, kiel frenezulo komencis kuregi al tiu loko, kie li vidis la junulinon. Permane li skrapadis la sablon, kiel hundo, kiam ĝi serĉas la kaŝitan oston.

Eble ankaŭ li ne sciis, kion li serĉas. Dume plurfoje ripetis.

–Elinjo, kie vi estas?

Profunde en la sablo li ekvidis ringon kun diamanto. Li rekonis ĉi ringo apartenis al la junulino.

Li eklevis metis en la poŝon kaj li serĉis plu.

–Ĉu vi serĉas Elizabeton? – demandis virina voĉo malantaŭ li.

Li returnis sin kaj mire li rimarkis sian onklinon Izabela.

Ŝi ridetis. De sur ŝia vizaĝo tute malaperis la timo. Kvazaŭ tie estus staranta alia onklino. Ŝi estis bonhumora kaj gaja.

–La knabino forvaporigis, kiel antaŭtagmeze aŭtune la nebulo, kiam la suno ekbrilas de malantaŭ la nuboj.

–Daŭrigota–



# Por infanoj

## Tri pizoknabetoj



Pizopatrino havis tri filetojn. Ili loĝis en sia belega, verda dometo en la ĝardeno proksime de la brasikoj.

La pizopatrino fabelis al siaj filetoj ĉiuvespere. La etuloj volonte aŭskultis la interesajn rakontojn pri la mondo.

Eble ĉi tiuj rakontoj vekis la interesiĝon de la pizoknaboj.

En iu tago la plej aĝa knabo diris al sia patrino.

–Panjo mia, mi deziras vidi la eksteran mondon ankaŭ propraokule.

La pizopatrino tre ektimis aŭdante sian filon. Li volis konvinki lin, ke li ne deziru iri ekster la dometon.

–Kara fileto mia, ne iru tien! La mondo estas danĝera kaj forrabos vin granda, nigra birdo.

La knabo ne obeis al sia patrino kaj li forlasis la dometon.

Antaŭ ol iri eksteren, li diris al siaj fratetoj.

–Se mi ne venintus hejmen, venu kaj serĉu min!

La plej aĝa knabo apenaŭ iris kelke da paŝoj, kiam subite super li la ĉielo malheliĝis. Unue li pensis, ke nubo proksimiĝas. Li plirapidigis siajn paŝojn por trovi ŝirmejon sub granda folio.

Vane li rapidis, la malhela nubo sekvis lin, kiu estis tiu timiga birdo, pri kiu la pizopatrino rakontis.

La pizo knabo ne povis kaŝi sin, la birdo ĉasakis lin.

La aliaj pizoknaboj atendis, atendadis sian fraton, sed li ne venis hejmen. Fine ankaŭ la meza knabo ekiris. Li decidis serĉi sian fraton.

Li longe iris tra kampoj kaj montoj, kiam ankaŭ super li ekaperis la granda, nigra birdo. Li vidis la danĝeron, sed kontraŭ tio li povis fari nenion. Malgraŭ la petego ankaŭ lin manĝis la birdo.

Nun ja ili estis duope en la kroko de la monstro.

Ekvidante unu la alian, ili ĝojegis kaj ili komencis cerbumi, kiel liberiĝi?

Ili povis elpensi nenion. El la kroko de la birdo ankoraŭ neniu sukcesis liberiĝi.

–Frato mia – diris la mezaĝa knabo – ,el ĉi tiu birdo ni ne povos eliĝi. Ĉi tie ni mortos. Kial ni estis malobeemaj kaj ni ne akceptis la konsilon de nia

patrino. Mi jam bedaŭras, ke mi deziris vidi la eksteran mondon.

Tiel ili malĝojis en la kroko de la granda, nigra birdo.

Hejme la pizopatrino kaj la tria knabo malpacience atendis la fratojn. Se dili ne venis.

Ili suspektis, ke okazis tragedio.

–Panjo mia, mi ekiras por serĉi miajn fratojn. Mi sentas, ili atendas mia helpon.

La pizopatrino ekploris kaj ŝi petegis.

–Filo mia, ne forlasu min! Se ankaŭ vi perdiĝos, mi mortos.

Ŝi ne povis konvinki la trian knabon. Ankaŭ li ekiris. Antaŭ la ekiro li petis sian panjon, doni al li pinglon. La virino ne sciis, kion li volas fari per ĝi.

–Panjo mia, - adiaŭdis de ŝi la tria pizoknabo – baldaŭe mi revenos kun miaj fratoj.



Estis belega somera tago. La tria pizoknabo fajfante iris, iradis sur la mallarĝa vojeto.

Longe nenio okazis. Nenie li vidis la grandan, nigran birdon. Jam li volis hejmeniri sen la trovo de siaj fratoj, kiam neatendite super li ekaperis la birdo. Ĝi ne hezitis. Ĝi tuj manĝis ankaŭ la trian knabon.

Nun jam ili estis trio pe ene. Liaj pli aĝaj fratoj koleris pri li, kial li ne restis hejme kun la patrino.

–Ne ĉagrenu, fratoj miaj! – li diris al ili. – Mi savos vin kaj ni ĉiuj hejmeniros.

Ili ne kredis, kion la frateto diris. Ili priridis lin.

La tria knabo prenis pinglon kaj per ĝi li komencis pikadi la krokon de la birdo. La pikado tre torturis ĝin. La birdo ne povis toleri la doloron en la kroko. Post kelkaj minutoj ĝi elvomis la tri pizoknabojn.

–Nun ni kuregu! – kriis la plej juna frato.

La tri pizoknaboj bonŝance hejmenkuregis, kie jam la pizopatrino atendis ilin ĉe la pordo. Ili rapide eniris la dometon kaj plurfoje ili neniam deziris vidi la eksteran mondon.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

Onklo Adalberto



# Humuro

- Avinjo, ĉu ankaŭ laŭ vi, homo devenas de simio?  
 –demandas la scivolema nepo de la avino.  
 –Jes, kompreneble – respondas la avinjo.  
 –Mi ne komprenas nur tion, kiu homo rimarkis unue, ke li jam ne estas simio.

×



- Kio okazis al vi, amiko?  
 –Mia edzino, eksciis la pasvorton de mia fejsbuko.

×

- Kiel plaĉas al vi la lerneja vivo? – patrino demandas sian fileton post la unua tago.  
 –Terure. Ni faras la taskojn kaj la instruistino ricevas salajron.

×



- Eble mi ŝajnas trankvila, sed jam en penso mi murdis vin kvinfoje.

×

# Humuro

Kampanano agonias. Lia urbana parenco demandas lin.

- Ĉu mi telefonu al kuracisto?  
 –Ne. Ni kutimis morti nature ĉi tie en la vilaĝo.

×



- Vi tre treege mankas al mi.

×

En la juĝejo

- La juĝisto demandas la akuziton.  
 –Kial vi ne helpis, kiam vi vidis, ke la murdisto deziras elpuŝi vian bopatrinojn el la fenestro?  
 La akuzito:  
 –Ĉar mi vidis, ke li povas fari tion ankaŭ sola.

×

